

Flandra Esperantisto



VLAAMSE ESPERANTISTENBOND
St. Klaradreef 59, BRUGGE




Tweemaandelijks Tijdschrift
27e Jaargang

mei juni 1960
Nummer 3 (292)

**Demandu provveturon per
la nova**

Ford Anglia

LA PLEJ BRILA EN SIA KATEGORIO



**rekta distribuanto por BRUGGE kaj
ĉirkaŭaĵoj**

GARAGE CANADA

GULDEN VLIESLAAN 68 BRUGGE

TEL. 34611

Flandra Esperantisto

Eldono de FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

REDAKCIO : Drs. F. Roose, Sinte Klaradreef, 59, Brugge - Belgujo
Tel. 319.81.

VLAAMSE ESPERANTISTENBOND

aangesloten bij **Universala Esperanto-Asocio**

VOORZITTER G. Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.

SECRETARIS : G. Maertens, Prins Leopoldstraat, 51, Sint-Kruis
Tel. 349.35.

PENNINGMEESTER : Mej. J. Terryn, Raapstraat, 74, Gent.

UEA-VERTEGENWOORDIGER :

Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan, 14, Blankenberge
P.C. 4161.35.

CORRESPONDENTIE-KURSUS :

A. Van De Velde, H. Pirennelaan, 25, Gentbrugge.

FLANDRA ESPERANTO INSTITUTO :

Blankenbergse steenweg, 72, Brugge. P.C. 3268.51.

Lidmaatschap :

Leden : 100 F (met inbegrip van het tijdschrift)

Steunleden : 150 F (idem)

Inwonende leden : 25 F (met inbegrip van " De Esperantist ")

Jongeren : 50 F (onder de 21 jaar)

Abonnement : 75 F

Postcheckrekening 2321.50

van de Vlaamse Esperantistenbond te Gent.

Tarief van de aankondigingen :

(geldt alleen voor firma's, niet voor correspondentie-adressen)

1 bladzijde : 500 F (afmeting 20 × 12)

1/2 bladzijde : 300 F (afmeting 10 × 12)

1/4 bladzijde : 150 F (afmeting 5 × 12)

Daar het bedrag verschuldigd voor de aankondigingen die meerdere malen moeten verschijnen, gefactureerd wordt na het verschijnen der 1ste aankondiging, wordt op de voormelde tarieven de volgende vermindering toegestaan :

20 % voor een aankondiging die 3 maal wordt opgenomen,

30 % voor een aankondiging die 6 maal wordt opgenomen.

Verdere inlichtingen nopens de aankondigingen in het sekretariaat.

BRUSELAJOJ

I

Karlo la Kvina iam dum ĉasado
apud Bruselo, en arbar' Berhema
la vojon perdis ĉe la noktinvido.
Ve, li neniam estis senproblema
ĉar lia regno havis tian grandon,
ke l' suno en ĝi konis ne subiron,
sed nun . . . por li jam tuŝis la terrandon.
Feliĉe li renkontis fine viron
lanternportantan, de el farmodomo
irante al Bruselo, kiu pretis
lin akompani kaj pri lia nomo
demandis, jen post iom al li petis :
— " Nu Karl', momenton tenu la lanternon "
Sin ŝargis Karl' per tio tre volonte
dum la kampul' . . . malŝargis la internon.
Ne longe teruriĝis li estonte,
ĉar en Flandrujo estis populara
la imperiestro, ruza la kampulo . . .
Kaj baldaŭ malfermiĝis la kampara
gastejo, kun surskribo sur tabulo :
" Karlo tenas la lanternon " Fam' :
neniam seraplombas Bruselan' !

II

Leopoldo, unua belga reĝo,
donacis al brusela asocio
por kiu kanti estis ĝua leĝo,
standardon belan laŭ la tradicio.
Aspektis la portisto malfortika . . .
La reĝo al li diris kompattone :
" Sinjoro, ĉu ĝi ne tro pezefika
estas al vi ? " Sed li, ne vortbezone,
respondis (Bruselan' ne malsagacas)
" Mi vere ŝajnas iomete febla,
sed kion Via Reĝa Moŝt' donacas,
nur estas ĉiam aĵo ja portebla "
Okazis tio en la jar' postkrista
mil-okcent-tridek-kvar, sed Bruselano,
nerespektima, funde realista,
plumovas sin sur la hereda plano,
kaj ne kaŝiĝas lia vigla lango
malantaŭ lia ĉiam gaja vango !

TYNEVERUM

Esperanto en de Aziatische volkeren

door
NGUYEN-VAN KINH,
*Vietnamese gezant te Moskou,
Boekarest en Tirana.*

Het 44ste Esperanto-Wereld-Congres, waar vele Afrikaanse en Aziatische landen vertegenwoordigd waren, heeft vooral door de vlotte manier van discussiëren en de grote mate van welsprekendheid laten zien, dat de internationaal taal Esperanto het meest geschikte communicatiemiddel voor de niet-Europese volkeren is. Wij hebben geen leger vertalers, geen bergen vertaalmateriaal en geen hypermoderne electronsche vertaalmachines meer nodig. Het op grote schaal verbreid worden van Esperanto in Japan, China, Indonesië, Vietnam, Armenië, Uzbekistan, Korea, Indië, Nepal, Cambodja, enz. toont aan, dat Esperanto, een levende taal, erkend wordt als de gemakkelijkst te leren taal voor Aziatische volkeren, wier talen geheel verschillend zijn van de Europese talen.

Esperanto is vele keren gemakkelijker dan Engels, Frans, of welke andere Europese taal, omdat hij redelijk, logisch en welluidend is en bovendien niet gespeend is van souplesse. Vele Japanse, Chinese en Armeense wetenschapsmensen, die één of twee Europese talen goed geleerd hebben, geven er de voorkeur aan voor hun boeken en uitwisseling van ervaringen met geleerden van over de gehele wereld, Esperanto te gebruiken. Enige jaren geleden veroordeelde een groep Chinese geleerden — n.l. Professor Lo Chou uit Sensi en zijn collega's —

in een briljante oproep het Latijn, dat tot nu toe als de officiële wetenschappelijke taal beschouwd werd, terwijl het gebruik van het Esperanto warm werd aanbevolen.

De laatste ervaringen en belevenissen van de Sovjet-specialist Armand in China en de Bulgaarse dokter Todorov in Vietnam, verteld in het Esperantotijdschrift "Nuntempa Bulgario" ('t tegenwoordige Bulgarije), bewijzen ons dat Esperanto met succes de technische internationale samenwerking ten dienste staat. De heer Armand kwam tot de conclusie, dat indien hij alle tijd, die hij gedurende zijn leven aan het leren van Esperanto heeft besteed, bij elkaar zou tellen, zijn studietijd niet langer dan ten hoogste vier maanden zou zijn. Een dergelijke korte studieperiode blijkt voldoende te zijn om op bevredigende wijze van gedachten te wisselen met Chinezen, Japanners en Duitsers, en zeer zeker met vertegenwoordigers van alle naties, die Esperanto spreken. Maar om in staat te zijn met afgevaardigden van de drie genoemde naties in hun eigen tal te spreken, zou ik meer dan de helft van mijn leven nodig hebben.

In Vietnam kunnen jongelui, die reeds een tiental jaren de Franse taal leren en praktisch gebruiken, deze taal nog niet zonder fouten schrijven. Na slechts een half jaar Esperanto-studie schreven zij in deze internationale taal zonder fouten!

De tegenstanders van het Esperanto pretendeerden dat het een kunstmatige taal is en dat hij

stierf vóór de dood van zijn schepper. De tegenstanders sterven, maar Esperanto leeft. Het geniale werk van Zamenhof is door miljoenen levenden overgenomen en voortgezet, zodat Esperanto meer dan ooit leeft en bloeit.

Zijn levende, nationale talen natuurlijk", dus niet kunstmatig voor alle mensen die de aarde bevolken? Stellig niet! Indien een taal de moedertaal van een volk is, dan is deze zelfde taal een vreemde en veelal een kunstmatige taal voor een ander volk. Laten wij bijvoorbeeld de Vietnamese taal vergelijken met de Europese talen. De Vietnamese taal is een éénlettergrepige taal, welks woorden onveranderlijk zijn. Deze taal kent geen grammaticale begrippen, dus hij kent geen meervoud, geen vervoeging, geen verbuiging. Hij heeft zes muzikale tonen, die de betekenis van het woord duidelijk maken. Elk onveranderlijk woord kan een naam, een bijvoegelijk naamwoord, een bijwoord, of een voorzetsel zijn volgens zijn plaats in de zin. Voor ons zijn dus alle Europese talen vreemd en diensengevolge totaal kunstmatig. Voor ons is iedere vreemde taal niet alleen kunstmatig, maar ook een totaal uit z'n verband gerukt geheel. In de Chinese taal — hoewel in menig opzicht op onze taal gelijkend — zegt men bijvoorbeeld Vietnam Pacdefenda Esperantista Asocio, terwijl wij zeggen: Asocio Esperantista Pacdefenda Vietnam. Esperanto staat beide woordvolgorden toe, zodat het in dit geval een natuurlijke taal is.

Voor veel Aziatische en Afrikaanse landen, waarvan de taal,

de literatuur, de cultuur door de andere landen bijna niet gekend worden, is Esperanto absoluut noodzakelijk voor de culturele uitwisseling. Aan alle landen, zoals Vietnam, die bijna geen vertaalde literatuur hebben en waarvan de oorspronkelijke literatuur nog weinig verspreid is, stelt het Esperanto zijn internationale en inhoudsrijke bibliotheek, bevattende meer dan 30.000 boeken, die een geheel leven kunnen vullen, ter beschikking. Wees niet verwonderd, indien ik U mededeel, dat in mijn land gedurende een bijna tachtigjarige Franse regering geen enkel werk van Victor Hugo, Anatole France, Maupassant, Zola, Balzac e.a. in de Vietnamese taal werd vertaald. Dank zij het Esperanto zijn wij bekend met boeken uit de wereldliteratuur zoals "Faraono" (Pharao), "Sinjoro Tadeo" "Quo Vadis"

Babywereld
KINDERWAGENS
DIEPESTR. 44
ANTWERPEN-TEL. 32.44.30

*Alles voor de
 Hygiëne en het comfort van uw Baby
 Het mooiste speelgoed*

Esperantistoj ĝuas rabaton.

“ Romeo kaj Julieto ” “ Eŭgenio Onegin ” “ La Revizoro ” enz.

Volgens het voorbeeld van Chinese en Japanse Esperantisten moeten de Aziatische en Afrikaanse volkeren Esperanto gebruiken om in contact te komen met de waardevolle voortbrengselen der internationale cultuur en hun eigen cultuur en folklore aan de wereld te tonen.

Esperanto, aangewend voor de culturele samenwerking, verdringt de nationale talen geenszins. Integendeel verrijkt het Esperanto de nationale talen en bevordert de opheffing van de talenchaos, de discriminatie en het teniet doen van de voordelen welke de ene nationale taal boven de andere geniet.

Wij wensen onze grote dankbaarheid voor Dr. Zamenhof, de geniale schepper van de taal, en voor alle Esperanto-schrijvers en vertalers, die ons een internationale schat ter beschikking stelden en die door hun activiteit bijdroegen tot de vriendschap tussen de volkeren, tot uitdrukking te brengen.

Wij beloven hun voorbeeld te volgen en nauw samen te werken met alle propagandisten, oratoren en cursusleiders, die voor de verbreiding van Esperanto in de Aziatische en Afrikaanse landen werken. Aan hen zenden wij onze warme groeten en hartelijke dank.

(Vertaald door J.V.)

NIA PRAPATRO.

Rim. de la Redakcio : Ni trovis novan kunlaboranton, en Hungarujo ĉi-foje. Li por ni tradukos regule kelkajn rimarkindajn mallongajn prozaĵojn. Jen sekvas la unua.

Bartha Miklos (1848-1906) ĵurnalisto kaj politikisto.

Inter praaj cedroj kaj longegaj palmoj malhele furiozas uragano. Rokoj disfendiĝas pro la ŝarĝo de la fulmotondroj, kaj praarbarojn elŝiras la teruriga tempesto. La senbridan nokton per blua flamo heligas la elverŝanta lafo de iu kratero. La sovaĝaj bestoj humiliĝinte ĝemkveras ĉe la buŝo de la kaverno. Eĉ imagi estas terurige tiun-ĉi revolucion de la naturfortoj.

El tiu-ĉi terura laborejo de la haoso eliĝas du virstaturoj, kvazaŭ ilin estus ĵetinta ia maltrankvila suba mondo sur la supraĵon.

La pli fortan nomis la posteuloj Kain.

La pli malforta, la pli juna, la pli senkulpa . . . mortis.

La kruda forto, la potenco, la memintereso venkis super la mildeco, la amo kaj la abnegacio.

La du staturoj baldaŭ malaperis, sed la longa vico de la ombroj restintaj post ili faris tiun-ĉi homaran legendon je *historio* de la tut-homaro.

Kiel nia prapatro — Kain restis tiam.

El la Hungara tradukis : Szalay Sandor.

La Unesko-Zamenhof celebriĝo dum 1960

La belga Plenrajtigita Ministro Julien Kuypers je la bazo de la decido.

En nia antaŭa numero, ni jam menciis la decidon de la Plenumkomitato de UNESKO, per kiu ĉiuj registaroj aliĝintaj al UNESKO estas invitetaj celebri, dum 1960, la noblan figuron de D-ro Zamenhof, laŭ ĉiuj rimedoj, kiujn ili juĝos plej oportunaj kaj efikaj.

La proponon pri tia celebriĝo faris, okaze de la Zamenhof-jaro 1959: Brazilo, Japanujo kaj U.E.A., kiel organizaĵo en konsultaj rilatoj kun UNESKO.

Poste do la propono venis antaŭ la Plenumkomitato, en kiu ne ĉiuj landoj estas reprezentataj sed nur kelkaj, kiuj, kiel en la Ligo de Nacioj, iatempe ŝanĝiĝas.

Nederlando ekzemple, nunmomente, ne estas reprezentata en la Plenumkomitato. Kaj la Nederlandaj Esperanto-istancoj do petis la belgajn fari, kune en ilia nomo, paŝon ĉe la belga reprezentanto, S-ro Julien Kuypers.

Al nia letero, tiu ĉi respondis, ne nur per formala promeso pri apogo, sed ankaŭ per vere afablaj kaj varmaj vortoj rilate al la nobla figuro de D-ro Zamenhof.

En la protokolo de la kunsido de la Plenuma Komitato, kiu okazis en Parizo, la 25an de novembro 1959, estas dirite ke *“la propono pri Zamenhof ricevis fortan apogon kaj estis unanime akceptita. S-ro Kuypers (Belgujo) deklaris, ke laŭ peto de la Nederlanda Nacia Komisiono de UNESKO “la Belga Nacia Komisiono decidis apogi la proponon koncerne la celebrado de la 100a datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof”.*

Same favore poste parolis S-ro De Alba (Meksikio), S-ro Wierzbowski (Polujo), S-ro Moreira de Mello (Brazilo), S-ro Soebroto (Indonezio) kaj S-ro Stempel (Venezuela).

Sed, — kiel jam dirite, — por ni, (kaj tre certe en Belgujo, kie okazos la 45a Universala Kongreso) ne povas temi nur pri kronigo... Tiu decido de UNESKO devas sproni nin ĉiujn al pli vigla laboro, ne nur interne en la kunvenoj mem de niaj grupoj, sed precipe eksteren al la granda, ĝenerale simpatia, sed plej ofte indiferenta kaj certe tro apatia publiko.

ARTMEBLOJ

KLASIKAJ MEBLOJ

STILMEBLOJ

MODERNAJ MEBLOJ

N.V. DE LATTER

Statiestraat, 29 EKKLO

NECESA DIALOGO

Kiam mi legis la unuan artikolon de sinjoro P. Beiszwanger en Fl. E. nro 4/1959 mi ĝojis ĉar mi pensis trovi en ĝi la novan spiriton ĉe la samideanoj, emon al dialogo kun niaj duonfratoj. Min konfirmis en tiu konvinko la rimarko de la redakcio.

Estas en tiu spiriteco de dialogo (t.e. malferma kaj atenta aŭskultado antaŭ ĉio) ke mi korektis kelkajn eldirojn de sinjoro P. B. rilate al la sintezo interlingva Interlingue-Occidental. Mi pensas kun Dro W.J.A. Manders ("Vijf Kunsttalen" "Interlingvistiko kaj Esperantologio") ke nur objektiveco kaj aperteco povas konduki nin al la dezirata celo.

Sinjoro P.B., ankoraŭ juna kaj impulsiva studento, tion bedaŭrinde ne rimarkis. Ni komprenu tion de li, kiu kun la tempo certe ankoraŭ maturiĝos kaj akiros pli grandan apertecon. Nun ni povas nur konstati ke li, en la fajro de siaj sentimentoj, polemikas, multajn sensencaĵojn diras por defendi (?) Esperanton kaj ke li eĉ ne plu scias kion li skribis en la unua artikolo. Ankaŭ la redakcio opiniis necese trankviligi lin diskrete.

Ne utilas tie ĉi refuti ĉiujn argumentojn (?) de sinjoro P.B. Pli konstruktiva estos konsideri kelkajn rimarkojn de la ĉefredaktoro mem kaj ilin kunfronti kun la modernaj interlingvistikaj postuloj.

Drs. F. Roose, kiu ĵus faris profundan studon pri "Lingvo kaj Vivo" de Waringhien, venis ankaŭ al pli scienca konvinko rilate al la vorttrezoro de la lingvo de Zamenhof. Li prave konstatas ke la mito de aŭtonoma deriva sistemo ne utilas al helplingvo, kiu volas servi ĉiujn branĉojn de la

scienco, ktp., kaj ke *priresponda* enkonduko de la internaciaj vortoj kiel neologismoj ege necesas. Mi ankaŭ konstatis tion en mia artikolo, kies intenco estis montri ke kvankam Interlingue-Occidental havas ŝajne pli komplikajn derivajn sistemon ol Esperanto, *tiu ĉi tamen tute servas por reguligi ĉiujn internaciajn terminojn en homogenaj sistemo*. Mi invitas afable sinjoron P.B. unue serioze studi Ile-Occ. antaŭ ol deklari ke tie regnas haoso. La aŭtoritata Akademiano Dro W.J.A. Manders mem agnoskas la perfektecon de Ile Occ., pri kies principoj li tamen ne povas akordiĝi (p. 33 Interlingvistiko...).

Kaj tio estas *LA* problemoj: *la esperantistoj diras ke ne la lingva perfekteco gravas por I.L., sed jes la jam gravaj akiritaĵoj: la organizoj, la servoj kaj aplikoj de Esperanto* 1). La aplikado de Esperanto devas paŝon post paŝo eniri ĉiujn internaciajn rilatojn. Esperanto celas esti La I.L. kaj por Okcidentanoj, kaj por Azianoj kaj Afrikanoj.

La interlingvistoj unualoke ne vidas tiel vaste. Ilia celo estas unue servi la sciencan (puran kaj aplikitan) mondon per taŭga helplingvo, kiu respektas kaj reguligas (normigas) la fakterminojn kaj devas esti de tuja kompreno por la sciencisto. Oni riproĉas al la interlingva sistemo ke ĝi nur atentigas la postulojn de la intelektuloj, sed kiaj homoj havas internaciajn rilatojn se ne la sciencistoj, teknikistoj, ktp. Ĉu estas la homo de la strato kiu urĝe bezonas adekvatan interkomprenilon? 2) La unua kondiĉo al kiu I.L. devas respondi estas esti akceptebla de la medicj

kiuj uzos ĝin. Ke psikologiaj faktoroj ludas ĉi tie ankaŭ gravan rolon ; ni povas bedaŭri ĝin sed ni nepre devas atenti. Ni ne prenu niajn dezirojn kiel realaĵojn !

Tre instruaj en tiu senco estas la vortoj de la, en fakmedioj, famkonata Doc. Dro-Inĝ. E. Wüster, gvidanto de la teknika komitato de la International Organization for Standardization ISO/TC 37, je pp. 200-201 de la UNESCO-raporto "Scientific and technical translating and other aspects of the language problem" (1957, 282 pp., 123 BF) "Esperanto-terminoj, laŭ mia scio, estis permesitaj en la unua eldono (1935 kaj 1938). Ĉar mi estis iu el la ĉefaj naciaj eldonistoj de tiu vokabulario (termino uzata universale kaj rekomendita de ISO/TC 37) mi partoprenis la diskutojn pri la demando ĉirkaŭ Esperanto, organizitajn de IEC Vocabulary Committee en la jaroj 1933 ĝis 1938. En la sama periodo (de 1933 ĝis 1935) la Société Française des Electriciens aldonis al ĉiu artikolo sinopsion (resumon) en Esperanto... Elektraĵ inĝenieroj, kiuj ne lernis Esperanton ne kapablis sufiĉe kompreni sinopsisojn en tiu lingvo spite de la fakto ke la radiokoj de la plejmulto de ĝiaj vortoj estas internaciaj. Tio rezultas de la gramatikaj finaĵoj en Esperanto kaj ĝia ĝerman-slava ortografio, ambaŭ ecoj kiuj forpuŝas multe da homoj. La forlaso de Esperanto por sinopsisoj estas pro tio pravigebla tiel longe kiel ne pli alta procento da legantoj estas lerninta tiun lingvon. Fakte tia forlaso estas en la pli bona intereso de Esperanto mem pro la malbona impresado kiun faras Esperanto-vortoj al multaj ne-esperantistoj. Aliflanke estas malfacile defendi ne

doni sinopsisojn en iu de la naturala-planlingvaj sistemoj. En tiuj sistemoj, la internaciaj vortoj aperas tre kompreneblaj al ĉiuj..."

La praktika disvastiĝo de Esperanto tute ne influas la sciencajn mediojn, kiuj staras tre skeptikaj rilate al ĝi. 3) Estas klare ke Esperanto, se ĝi deziras servi al pli granda internaciigo de la scienca komunikado, nepre devas evolui kaj sekvi la modernan tempon. Grava laboro atendas la Akademion — kiel sinjoro Roose ankaŭ patose ekkriis 4) — por ekstudati la terminologian strukturon de la internaciaj vortoj kaj serĉi normaligon en la kadro de la lingvo mem, kontentigan por la medioj kiuj bezonas internacian komunikan sistemon. La terminologiaj postuloj de la koncernaj branĉoj estu nepre atentataj !

Seriozaj adeptoj de la helplingva ideo, ni devas esti pretaj forlasi arĥaikajn vojojn por vidi la eblecojn kaj postulojn de la reala vivo hodiaŭa. Pro tio ni malfermu dialogon kun ĉiuj de bona volo, kun ĉiuj, kiuj serĉas sciencan solvon de la internacia problemoj lingva, kiu nur povas esti akirita per teoriaj esploroj, ne multe aprezitaj ĝis nun en esperantistaj medioj.

Willy WELLEKENS.

Rim. de la Red. :

- 1) Jes ankaŭ la lingva perfekteco gravas, tiom kiom io povas esti perfekta en la mondo.
- 2) Ne ; sed ankaŭ ne nur la intelektuloj.
- 3) Ekzistas efektive multaj sciencistoj kiuj vivas en ebura turo, izolitaj de la ilin ĉirkaŭanta mondo.

- 4) Ĉu patose? Mi ne sciis; kaj ĉiuokaze mi ne kriis, nur skribis.
- 5) Teoriaj esploroj kiuj poste devas esti provitaj de la vivo... ĉar multaj teoriuloj ignoras leĝojn de la vivo; cetere multaj psikologiaj ecoj, postuloj de la

vivo estas al ni ankoraŭ nekonitaj.

Lasta rimarko ŝajnas al ni ke tiu-ĉi artikolo — pro kiu ni dankas la fervore serĉantan samideanon W. Wellekens — ne kontraŭdiras la artikolon de nia ŝatata Germana kunlaboranto P. Beiszwanger.

Radio-aferoj

1) "La Voĉo de Ameriko"

Pri tiu elsendo ni jam raportis. Dum la monatoj marto, aprilo, junio kaj julio ĝi elsendis sep mal-samajn 30minutajn esperanto-programojn, entute 20foje. Sekve de tio la radiostacio ricevis 900 leterojn el 64 landoj kaj pli ol 350 demandojn por la rubriko "Demandoj kaj Respondoj pri Ameriko"

2) "Parolas Varsovio..."

**PROGRAMO DE LA
ELSENDOJ EN ESPERANTO**
ĝis 15 oktobro 1960

Radio Varsovio disaŭdigas ĉiutage de la horo 16.30 ĝis la 17.00 horo de mezeŭropa tempo duonhoran programon en Esperanto sur la jenaj ondoj

mallongaj
kaj sur la meza 249 m (1205 kc/s.

Aŭskultu niajn konstantajn elsendojn.

Lunde: Felietono pri politika, socia, ekonomia, kultura, ofte ankaŭ priesperanta temo; ĉiun duan semajnon: Scienca tribuno.

Marde: Vortmuzika elsendo

prezentanta polan muzikon kaj muzikistojn.

Merkrede Kultura kroniko kaj Koncerto kun bondeziroj.

Jaŭde: Komentario de Observanto pri aktualaj temoj kaj Letterkesto, en kiu la Redakcio respondas al leteroj de aŭskultantoj.

Vendrede: Literatura rubriko. Vi trovos en ĝi fragmentojn el la esperanta literaturo originala kaj tradukita kaj ankaŭ eseojn pri literaturaj temoj.

Sabate: Sonrevuo: La semajno en Pollando, kiu entenas raportojn pri tutpollandaj okazintaĵoj en la koncerna semajno.



Dimanĉe: La panoramo de internaciaj eventoj en la koncerna semajno kaj esperantista magazino: Sub la verda stelo, en kiu vi povas trovi novaĵojn el la tuta Esperantujo, intervjuojn, recenzojn, esperantajn kanzonojn, rubriketon por infanoj titolitan "Koboldo"

Krom tio ĉiutage: novaĵoj el Pollando kaj el la mondo.

Noto: ĉiu povas senpage ricevi ilustritan prospekton pri la Pola radio. Skribu al: Pola Radio Esperantaj Disaŭdigoj VARSOVIO.

Esperantisia Geedziĝo en Bruselo

F-ino Ada Sikorska kun la K.K.S., S-ro G. C. Fighiera



La novaj geedzoj, post la geedziĝo, sur la ŝtuparo de la Urbdomo, kun, mal-tantaŭ si, S-roj M. Jaumotte kaj R. Jacobs, atestantoj. Ĉirkaŭas ilin f-ino Weyn, kiu transdonis florojn nome de la Brusela Grupo, kaj ĉefurbaj bruselaj amikoj : G-roj H. Castel kaj F-ino M. Kestens.

Merkredon, la 20an de aprilo, geedziĝis en Bruselo, pola samideanino, « libertempanta » dum kelkaj semajnoj en Belgujo, F-ino Ada Sikorska, radio-ĵurnalistino en Varsovio, kaj nia Konstanta Kongresa Sekretario, S-ro Gian Carlo Fighiera.

Ne estis kompreneble hazarde, ke ŝi libertempis en nia lando. Ŝi venis kun la espero, ke povos esti trovata la ebleco por plenumi ĉiujn formalajojn, — iom komplikajn kiam temas pri du eksterlandanoj, kiuj fakte eĉ ne « loĝas » en Belgujo —, por ke ŝi povu edziniĝi ankoraŭ dum tiu libertempo, kiu laŭ pasportvizo devis nepre finiĝi la 22an.

Cio efektive enordigis kaj tiel S-ro Maur. Jaumotte, prezidanto de la L.K.K., kondukis ŝin antaŭ la skabeninon de Bruselo, F-inon Van den Heuvel, por ŝia unuigo kun nia K.K.S. Plej afable, la skabenino bondeziris la novedziĝintojn, ankaŭ en itala lingvo, kaj deziris al ili plej belan komunan vivon.

Post la edziĝa ceremonio, kelkaj samideanoj kuniĝis, kun la junaj geedzoj en la hejmo de la 45a U.K., kie okazis meze de vera florbedo, malgranda akcepto.

Vespere, sekvis en la bela restoracio « La Metioj », festeneto por kiu enskribiĝis kelkdekoj da esperantistoj, kiuj tiel volis, — iomgrade, — anstataŭi la forestantajn parencojn.

Kongresa Honora Kolono

Listo de la belgaj partoprenontoj al la U.K.

Ni aperigas ĉi sube la nomojn de la enloĝantoj de nia lando, kiuj aliĝis al la 45a Universala Kongreso, ĝis la 15a de junio 1960 :

- | | |
|--------------------------------------|--|
| 9. Jaumotte, Maurice, Antverpeno | 122. Mathieu, René, Lieĝo |
| 10. Maertens, Grégoire, Bruĝo | 123. Mathieu, Lucie, Lieĝo |
| 69. Sielens, Henri, Antverpeno | 126. Gorgemans, Dora, Bruselo |
| 70. Fighiera, G.C., Bruselo | 127. Derks, Willem, Bruselo |
| 71. Jacobs, René, Bruselo | 139. Ernst, Elfriede, Bruselo |
| 72. De Marré, Luc, Antverpeno | 154. De Roover, Hendrik, Antverpeno |
| 73. Oleffe, Jean, Bruselo | 155. De Roover, Paula, Antverpeno |
| 74. Roost, Marcel, Antverpeno | 156. De Roover, Paul, Antverpeno |
| 75. Huysmans, Rosette, Bruselo | 157. Hendrickx, Jaak, Antverpeno |
| 76. Jaumotte, Roger, Antverpeno | 159. Beckers, Alfons, Kwaadmechelen |
| 77. Plyson, Julia, Bruselo | 160. De Cock, Palmyre, Aalst |
| 78. Verstraeten, Jules, Antverpeno | 161. De Maeyer, Jozef, Wijchmaal |
| 79. Volders, Fernand, Antverpeno | 163. Nanquette, Maurice, Bruselo |
| 80. Weyn, Margriet, Bruselo | 164. Isaacson, Florence, Bruselo |
| 81. Jaumotte, Marguerite, Antverpeno | 165. Piron, Pierre, Namuro (Brus.Gr.) |
| 82. Jaumotte, Félicie, Antverpeno | 166. Dewerchin, Simonne, Bruselo |
| 83. Jaumotte, Viviane, Antverpeno | 172. De Smet, Wim, Antverpeno |
| 84. Sielens, Magda, Antverpeno | 173. Borremans, Constant, Antverpeno |
| 85. Jacobs, Rose, Bruselo | 180. Bas, Lodewijk, Bruselo |
| 86. Jacobs, Jeannine, Bruselo | 181. Jacobs, Jan, Antverpeno |
| 87. De Marré, Mariette, Antverpeno | 182. Jacobs, Bertha, Antverpeno |
| 88. Kempeneers, Paul, Bruselo | 184. Vercruyssen, Alfons, Antverpeno |
| 89. De Brouwere, Gerard, Kortrejko | 219. Declerck, Alfred, Ostendo |
| 90. De Brouwere, Yvonne, Kortrejko | 220. Declerck, Christian, Ostendo |
| 91. Soyeur, Joseph, Lieĝo | 221. Willems, Madeleine, Bruĝo |
| 92. Terryn, Juliette, Gento | 222. Poupeye, Charles, Bruĝo |
| 94. Van Eynde, Remy, Antverpeno | 231. Robert, Dorothea, Bruselo |
| 95. Van Eynde, Rachel, Antverpeno | 232. Lamberts, Victor, Bruselo |
| 96. Balleux, René, Antverpeno | 233. De Cuyper, Georges, Charleroi |
| 97. Balleux, Nathalie, Antverpeno | 234. Devillez, Marcel, Charleroi |
| 98. Van den Bossche, Georges, Antv. | 235. Daems, Marguerite, Bruselo |
| 99. Bernaerts, Lea, Antverpeno | 236. Daems, Maurice, Bruselo |
| 100. Van der Weken, Elsa, Antverpeno | 237. Denoël, Pol, Lieĝo |
| 102. Moriamé, Marcelle, Antverpeno | 238. Denoël, Adèle, Lieĝo |
| 103. Geers, Blanche, Antverpeno | 239. Denoël, Bruno, Lieĝo |
| 104. Obozinski, Simone, Bruselo | 240. Denoël, Serge, Lieĝo |
| 105. Kestens, Mahtilde, Bruselo | 241. Henrion, Joseph, Lieĝo |
| 106. Castel, Hector, Bruselo | 272. Geukens, Louis, Millen-Limburg |
| 107. Castel, Lucy, Bruselo | 279. Groverman, Marie-Mad., Bruĝo |
| 108. Jirousek, Marcel, Bruselo | 280. Schmitz, Roxane, Bersillies-L'abb. |
| 109. Staes, Elly, Bruselo | 281. Schmitz, Paulette, Bersillies-L'ab. |
| 110. Montmirail, Jos., Antverpeno | 282. Schmitz, Guy, Bersillies-L'abbaye |
| 111. Montmirail, Mar.-L., Antverpeno | 283. De Krom, Stafonova, Bruselo |
| 112. Vermuyten, Hector, Antverpeno | 284. Boffejon, Annie, Antverpeno |
| 113. Vermuyyten, Blanche, Antverpeno | 285. Boffejon, Hector, Antverpeno |
| 114. Lecat, Rena, Antverpeno | 286. Tytgat, Paula, Antverpeno |
| 115. Hofkens, Mathilde, Antverpeno | 287. Tytgat, Carlos, Antverpeno |
| 116. Hofkens, Hélène, Antverpeno | 290. Maertens, Germaine, Bruĝo |
| 117. Merckx, Livine, Antverpeno | 291. Iserentant, Roger, Bruĝo |
| 118. Brack, Hortense, Antverpeno | 292. Sprengers, Gerda, Mehleno |
| 119. Peeters, Clara, Antverpeno | 293. Sprengers, Herwig, Mehleno |
| 120. Debacker, August, Antverpeno | 294. Sprengers, Juul, Mehleno |
| 121. Debacker, Germaine, Antverpeno | 295. Sprengers, Angelina, Mehleno |

296. Begodt, Anna, Gento
 297. Lycke, Maria, Gento
 298. Van de Velde, Adhemar, Gento
 299. Volders, Maria, Antverpeno
 300. Couwenberg, Albine, Blankenberge
 301. Couwenberg, Franç., Blankenberge
 302. Paesmans, Eugene, Antverpeno
 344. Schumacher, Hubert, Bruselo
 345. Samyn, Albert, Bruselo
 346. De Smedt, Petro, Dendermonde
 355. Van Gulck, Jozefo, Antverpeno
 358. Callewaerts, Paul, Kortrejko
 367. Van Herck, Nico, Antverpeno
 365. Leibovitch, Golda, Antverpeno
 366. Mathieux, Fernand, Bruselo
 368. Jaume, Ginette, Charleroi
 369. Jaume, René, Charleroi
 370. Van de Velde, Marguerite, Gento
 371. De Coene, Elvire, Antverpeno
 393. Demol, Maurice, Bruĝo
 404. Meurrens, Anna, Lovenlo
 405. Meurrens, Leona, Antverpeno
 491. Decorte, Arni, Bierbeek (Br.)
 508. Laurent, Antoine, Bruselo
 519. Rogister, Camille, Verviers
 520. Marmenout, Albert, Blankenberge
 567. Collard, Georgette, Lieĝo
 568. Haid, Annie, Lieĝo
 569. Demarche, Raymonde, Verviers
 570. Demarche, Toussaint, Verviers
 571. Vanbreuse, Jeanne, Verviers
 572. Vanbreuse, Georges, Verviers
 573. Herion, Andrée, Verviers
 574. Herion, Joseph, Verviers
 598. Poupeye, Marcel, Bruĝo
 599. Poupeye, Yvonne, Bruĝo
 605. Pilloy, Michel, Ottignies
 606. Poupeye, Gabrielle, Bruĝo
 662. Bernaerts, Adeline, Lier
 663. Pittoors, Achiël, Antverpeno
 664. Declercq, Maurice, Gento
 665. Curnelle, Magdal. (Fr.)
 667. Laga, Lukas, Kortrejko
 668. Top, Marie-Jeanne, Veurne
 669. Samijn, Pol, Roeselare
 670. Ponnet, Harnold, Gento
 671. Van Wezel, Ada, Bruĝo
 672. Cortvriendt, Emile, Antverpeno
 675. De Boes, Irma, Gento
 676. De Boes, Gerard, Gento
 677. Meeus, Godelieve, Kortrejko
 678. Meeus, Constant, Kortrejko
 679. Roose, Henriette, Bruĝo
 680. Roose, Fernand, Bruĝo
 684. Martens, Roger, Bruĝo
 685. Vanhulle, Kamiël, St.-Truiden
 687. Lödör, Edmond, Gento
 688. Vercammen, Leo, Mehleno
 689. Vercammen, Martine, Mehleno
 690. Roose, Randi, Bruĝo
 691. Roose, Ingrid, Bruĝo

692. Meeus, Vera, Kortrejko
 743. Swinne, Félix, Bruselo
 744. Hart, Jeanne, Bruselo
 745. Hart, Petro, Bruselo
 746. Jacobs, Maria, Antverpeno
 749. Van Humbeeck, Roger, Mehleno
 750. Nachtergaele, Elsa, Gento
 751. Nachtergaele, Juliette, Gento
 752. De Winter, Elisabeth, Antverpeno
 753. Schellekens, François, Antverpeno
 754. De Hondt, Henri, Antverpeno
 755. De Hondt, Jeanne, Antverpeno
 758. Enzlin, Anny, Antverpeno
 760. Oleffe, Suzanne, Bruselo
 761. Oleffe, Madeleine, Bruselo
 762. Van der Stempel, Rita, Bruselo
 763. Van der Stempel, David, Bruselo
 765. Geron, Jean-Marie, Verviers
 849. Schodduyn, Herman, Bruselo
 851. De Ketelaere, Johanna, Antverp.
 875. Prager, Jean, Bruselo
 887. Op de Beeck, Edgar, Antverpeno
 888. Coeck, Donaat, Menen
 890. Jacques, Henny, Antverpeno
 896. Lostrie, J. Robert, Kraainem-Wez.
 899. Deruyver, Emmanuel, Namuro
 977. Luyten, Frans, Antverpeno
 980. Rohen, Edmond, Sint-Truiden
 995. Pieters, Etienne, Dendermonde
 997. Ross, Marthe, Bruselo
 1056. Bray, Louis, Charleroi
 1087. Corveleyn, Richard, Kemzeke
 1049. Maes, Germaine, Bruselo
 1050. Maes, Raoul, Bruselo
 1057. Fichet, Mireille, Charleroi
 1058. Fichet, Simone, Charleroi
 1059. Fichet, Marcel, Charleroi
 1060. Orsolini, Andrée, Charleroi
 1061. Paulus, Raymond, Charleroi
 1062. Van Geit, Filemon, Bruselo
 1063. Peeters, Maria, Herentals
 1099. Mention, Marguerite, Verviers
 1100. Chaineux, Jeannine, Verviers
 1120. Koeune, Jules, Verviers
 1121. Kremer, Josette, Verviers
 1125. Gruslet, Angèle, Gento
 1153. Lemme, Marcel, Lieĝo
 1266. Trekels, Frans, Budingen (Br.)
 1365. Tousseyn, Camille, Jabbeke
 1364. Demesmaeker, Louis, Aalst
 1368. T'Seven, Lionella, Antverpeno
 1370. Buysse, Els, Antverpeno
 1391. Van Mullem, Madel., Blankenberge
 1439. Demesmaeker, Louis, Liedekerke
 1447. De Kegel, Robert, Charleroi
 1502. Vertessen, Godelieve, Veerle-Antv.
 1503. Daniels, Marie-José, Overpelt (L.)
 1540. De Doncker, Lode, Turnhout
 1541. Hellebaut, Robert, Turnhout

(Daŭrigota)

La 45a Universala Kongreso de Esperanto

OFICIALAJ KOMUNIKOJ

Baza artikolo :

Jenaj lokaj Esperanto-Societoj mendis la Kongresan bazan artikolon por organizi belgajn vesperojn Horsens, Nova Zagora, Epernay, Fécamp, Wattrelos, Toulouse, Bad Hersfeld, Barcelona, Moya, Papa, Poznan, Torun, Selzach, Cittadella, Parizo, Nordfranca E.-Federacio, Göteborg, Nybro, Uppsala, kaj Trelleborg.

Sonbenda programo :

L.K.K. preparis 34-minutan sonbendan programon kun belga (flandra kaj valona) muziko, mesaĝo de la Prezidanto de L.K.K., parolado de la K.K.S. kaj oficiala invito de la Urbestro de Bruselo. La sonbendo estas senpage mendebla ĉe la kongresa oficejo flanke de lokaj Esperanto-societoj regule aliĝintaj al Landa Asocio.

Jenaj Esperanto-Societoj ĝis fino de marto mendis la kongresan sonbendon: Angers, Wattrelos, Moya, Trelleborg, Varsovio, Bad Hersfeld, Hannover, Esslingen, Bammental, Wuppertal, Blieskastel/Saar, Hago, Horsens, Nové Zámky, Nova Zagora, Pazargik, Torino, Bydgoszcz, Munkeno, Welper-Ruhr, Nürnberg, Hamburgo, Sutton, Cambridge, Leewarden, Liono, Marq-en-Barœul, Zurich, Pisek, Zizkova, Gara Levski, Kubrat, Bjala, Sarajevo, Caracas, Steyr.

Muzikaj programoj :

La kvarteto « Beltono » de la Pola Radio kantos en Esperanto dum la muzikaj programoj de la Universala Kongreso.

Aliflanke la 60-persona horo de Esperanto-Filmo Germanujo prezentos programon de diverslandaj popolaj kantoj.

Filmoj en Esperanto :

Preskaŭ seninterrompe dum la kongresa semajno estos projekciataj en Bruselo serio da elitaj belgaj turismaj filmoj kun sinkronizita parolo en la Internacia Lingvo. La parolo estas zorgita de la Esperanto-Societoj en Antverpeno, Bruĝo kaj Bruselo.

Speciala kurso :

La Kongresa Komitato malfermis specialan kurson por la turismaj gvidistinoj (hôtesses) de la urbo Bruselo.

Stipendioj por la Universala Kongreso :

Brita Esperantista Asocio asignis du senpagajn aliĝojn kaj premiojn de 25.-anglaj pundoj al konkurso por gejunuloj de la Junulara Sekcio de B.E.A.

En la kadro de sia konkurso, Esperanto-Filmo Germanujo disponigas du stipendiojn de po 150.— kaj 90.— gm. por partopreno en la Universala Kongreso.

Fervoja rabato :

La belgaj fervojoj asignis 25 %-an rabaton al ĉiuj kongresanoj, kiuj partoprenos en la 45-a Universala Kongreso de Esperanto en Bruselo.

Somera Universitato :

La Estraro de U.E.A., dum sia Paska kunsido, akceptis jenan programon por la Internacia Somera Universitato en Bruselo :

1. « Internacijuraj problemoj de spacveturado » (Prof. D-ro Ivo Lapenna)
2. « Juraj problemoj pri atoma energio » (Prof. D-ro Marcel Roost)
3. « La eŭropa angilo tute ne frajas! » (Kuratoro C. Stop-Bowitz)
4. « La belga literaturo, vidata el Francio » (Prof. Gaston Waringhien)
5. « Toponimio aŭ studo de loknomoj » (Prof. D-ro W.E. Collinson)
6. « Rilatoj inter Kanariaj Insuloj kaj Flandrujo » (D-ro Juna Régulo Pérez)
7. « Jogo, Filozofio, celo kaj praktiko » (Lic. Tibor Sekelj)
8. « Esperantaj kantoj kaj ilia komponado » (Frank Merrick, F.R.C.M.)

Oratora konkurso :

La Estraro de U.E.A. decidis, ke la Oratora Konkurso enhavu jenajn temojn :

- « Internaciismo, naciismo kaj patriotismo »
- « Aspiroj de la junularo en mia lando »
- « La internacia jaro de la rifuĝinto »
- « Sporto — ĉu rimedo de internacia amikiĝo ? »
- « Virinaj rajtoj »

Rajtas partopreni en la Oratora Konkurso gejunuloj ĝis 28 jaroj. La premioj estos jene dividitaj :

1-a premio = 2.500,— b.fr.



HET WELGEKENDE
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING

in't duifken

GROTE KEUS
IN GEREDE KLEDING.

KOSTUMEN	SPORTJASSEN	BROEKEN
UNIFORMEN	GABARDINEN	LODENS

STIJLVOL MAATWERK



KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

2-a premio = 2.000,— b.fr.

3-a premio = 1.500,— b.fr.

La unua premiito ricevos, krome, arĝentan pokalon kun la surskribo « Oratora Konkurso de U.E.A. — Premio Ivo Lapenna » — persona donaco de la Ĝenerala Sekretario de U.E.A. La pokalo, kun engravurita nomo de ĉiu unua premiito, estos transdonita ĉiujare de gajninto al gajninto. La juĝokomisiono konsistas el : S-ro M. Jaumotte, Prof. G. Waringhien kaj S-ro E. Lapenna.

Sekcioj :

La Estraro de U.E.A. decidis, ke la Kongreso laboru en du sekcioj :

1) « Esperanto en la lernejoj ». (Prezidanto : Prof. D-ro I. Lapenna)

2) « Kultura kontribuo de Esperanto al la Granda Projekto de UNESKO Oriento-Okcidento ». (Prezidanto S-ro Norman Smith.)

Katolika diservo :

La katolika diservo okazos en la Preĝejo S. Gudulo. Pastro Edmond Rohen predikos pri « La Universala tasko de la Eklezio ».

Teatra vespero :

La internacia Arta Teatro gvidata de S-ro S. Flego ludos en Esperanto por la kongresanoj la triaktan komedion de Goldoni « Kurioza okazaĵo ».

Foto-ekspozicio :

La Loka Kongresa Komitato decidis organizi internacian ekspozicion de fotografaĵoj okaze de la 45-a Universala Kongreso en Bruselo, kun premioj de diversaj grandaj foto-firmaoj de Belgio. Per tia unuafoja ekspozicio L.K.K. esperas respeguligi la internaciecon de Esperanto.

Oficiala antaŭkongreso :

Oni ricevas informojn pri la Oficiala

RABATO POR ESPERANTISTOJ

Antaŭkongreso en Arnhem (de la 27-a ĝis la 29-a de julio 1960) ĉe la sekretario : S-ro H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem (Nederlando).

Fakaj kunsidoj :

Mendis Fakajn Kunsidojn :

— Esperanto Sakligo Internacia. Adreso : S-ro Torsten Lindberg, Präsebo, Svedujo.

— Internacio de Militrezistantoj « Bazaj principoj de pacifismo ». Adreso S-ro Alfred G. Tucker Birchcroft, Pilgrims way, Harbledown, Canterbury, Kent, Britujo.

— Kristana Esperantista Ligo Internacia. Adreso S-ro De de Boer, Drui-venstr. 32, Den Haag, Nederlando.

— Veterana Esperantista Klubo : « La frujara aktiveco de la pioniroj ». Adreso : S-ro Maurice Lewin, 33 Kingscroft Ave, Dunstable 674, Britujo.

— Eŭropa Lingvo-Kampanjo « Historio kaj nuna stato de la eŭropa integriĝo ». Adreso D-ro Wilhelm Herrmann, Bürstadt str. 3, Lampertheim/Hessen, Germanujo.

— Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio, D-ro Rudolf Klimek, ul. Braterska 18, Kraków, Pollando.

— Budhana Ligo Esperantista, S-ro M. Bury, Boîte Postale 89, Liège I, Belgio.

— Kvakera Esperantista Societo, S-ro J. Saunders, Sydney Lodge, Bath Rd., Ventnor I W, Britujo.

— Rotario Internacia, S-ro Maurice Lewin, 33 Kingscroft Ave., Dunstable 674, Britujo.

— Studenta Tutmonda Esperantista Ligo « Problemoj de la Studenta Ligo, Enkonduko de Esperanto en la Universitatojn ». Adreso : S-ro Paul Ciliga, 17 rue Duguay-Trouin, Paris VI, Francujo.

— Internacia Katolika Unuiĝo Espe-

rantista : « Internacia katolika laborista junularmovado ». Adreso : Sac. A. Beckers, Kwaadmechelen, Belgujo.

— Internacia Fervoja Esperantista Federacio « La belgaj fervojoj. Fervojoj kaj lingvobaroj Prizorgado de belgaj fervojistidoj ». Adreso : Esperanto, Gare Centrale, Bruselo.

— Internacia Geografa Asocio. Adreso : S-ro von der Ley, Ulrichstrasse 18, Tailfingen/Württ., Germanujo.

— Internacia Scienca Asocio Esperantista. Adreso : Prof. D-ro B. Popovic, Zagrebacka 18, Sarajevo, Jugoslavio.

Nova karavano :

Brita Esperantista Asocio anoncas karavanon al la Universala Kongreso. Komisiitino S-ino Elsa M. Rapley, 89 Mount Pleasant, Ruislip, MMdx., Britujo.

Baza artikolo :

Jenaj lokaj Esperanto-societoj mendis la kongresan bazan artikolon por organizi vesperojn pri Bruselo : Junula Sekcio de Krakovo, Göttingen, Lund.

Sonbendo :

Jenaj lokaj Esperanto-societoj mendis la kongresan sonbendon : Moyà, Manresa, Sabadell, San Feliu de Codinas, Manlleu, Tarrasa, Barcelona, Madrid, Valladolid, Pontavedra (ĉiuj en Hispanujo), Köln, Münster, Steyr, Zizkova, Sofio, Meadville, Rio de Janeiro. Ĝis fino de aprilo la kongresa sonbendo estis mendita de pli ol 80 urboj en 20 landoj.

Adoptaj Gepatroj :

Transprenis la « Adoptan Patrecon » : S-ro J. Verstraeten (Antverpeno), Ges-oj de Vries (Nederlando), Esperanto-societo de Dijon (Francujo), Esperanto-societoj de Borlänge kaj Linköping (Svedujo), Ges-roj Heidelberg (Usono), Skota Esperanto-Federacio (Britujo), S-ino M. Vandeveld (Belgujo), S-ino Woessink (Nederlando), Karlarega Esperanto-societo (Belgujo), S-ro Van Eynde (Belgujo), Esperanto-societo de Lieĝo (Belgujo), F-ino Terriijn (Belgujo), D-ro A.K. Beck (Britujo).

Al ĝi aliĝis 45 individuaj esperantistoj kaj Esperanto-societoj. Tri aliaj infanoj el Finnlando estas invititaj veturi gaste al Bruselo por partopreni en la 5-a Internacia Infana Kongreseto.

Fervoja rabato :

La 25 % rabato de la belgaj fervojoj estas valida de kvin tagoj antaŭ la Kongreso ĝis kvin tagoj post ĝia fermo.

La rabato estas ricevebla je prezento de la speciala rabatkarto, sendita al ĉiu partoprenonto kun la Dua Bulteno, sur kiun la kongresano devas nepre aldoni sian nomon kaj adreson.

Gvidataj vizitoj :

La Loka Kongresa Komitato organizas jenajn fakvizitojn en Bruselo :

1. Muzeo de Belgaj Artoj : La Muzeo de Antikva Arto en Bruselo enhavas i.a. grandan kolekton de la majstroj de la antaŭaj Malaltaj Landoj de la VIII-a, XI-a, XV-a, kaj XVI-a jarcentoj, salonojn de flandraj, francaj kaj nederlandaj primitivaj pentristoj de la XIV-a kaj XV-a jarcentoj, kaj italajn, germanajn, francajn kaj hispanajn pentraĵojn. La Muzeo posedas, i.a. plurajn Bosch, Memling, Bruegel, Frans Hals, Van Dyck, Gérard David, Mesys : apartaj salonoj estas dediĉitaj al Rubens kaj al Jordaens. Gvidos la viziton Doktorandus F. Roose el Bruĝo.

2. Banko de Bruselo : La konstruaĵo de la « Banque de Bruxelles », kiu situas en la kadro de la Reĝa Placo, estas interesa el duobla vidpunkto de sia arkitekturo kaj de sia labororganizo profesia. Iama patricia rezidejo de la XVII jarcento, la palaco konservis sentuŝe siajn originalajn stilon kaj dekoraciojn : honora korto kaj pompa marmora ŝtuparo, vitraĵoj, tapiŝoj kaj tapetaĵoj riĉigas antikvajn salonojn kaj artoverkojn. La Banko posedas la unuajn aŭtogiĉetojn de Eŭropo, kie la aŭtomobilistoj efektivas la operaciojn sen forlasi la veturilon kaj kie la kontroloj estas farataj per televido. La vizito estas organizita de S-ro J. Oleffe, bankfunkciulo kaj kasisto de L.K.K. La vizito estas interesa por bankoficistoj kaj artamantoj.

3. Mehanigita Poŝtoŝtacio : La Poŝtadministracio de Bruselo centrigis siajn dispartig-servojn en mehanigita komplekso proksime de la plej grava stacidomo de Belgujo. Por ekipi la necesan konstruaĵon oni imagis vertikalajn mehanismojn kunligitajn kun horizontalaj sistemoj. Ĉiu operacio rilatanta al korespondaĵo, inkluzive de la transporto de la sako al aŭ el la stacidomaj peronoj, okazas aŭtomate. 90.000 leteroj estas traktataj ĉiuhore. La tuta reto, ekipita per optika signalaro, estas videbla ankaŭ de ekstere, ĉar la eksteraj vandoj de la palacego estas el vitro. La mehanigita poŝtoŝtacio de Bruselo estas la plej moderna en Eŭropo.

Recencoj...

D. B. GREGOR : **La Esperanta traduko de la malnova testamento**. 57 p. — En komizio ĉe Heroldo, Scheveningen. Prezo : gld. 2.10.

Krom la dek-biblia konkordanco de 518 diskutindaj versoj la broŝuro, precipe destinita al pristudentoj de la biblio, donas interesajn sciindaĵojn pri la gravaj bibliaj tradukaĵoj de D-ro Zamenhof, konkludante ke tiu ĉiam provis doni tradukon plej konforman al la hebrea originalo kaj kunteksto, kaj ke li ofte interpretis la malfacilaĵojn. Fine la aŭtoro konsideras la parton, kiun havis la biblia komitato en la traduko kaj sekvigas indekson de la cititaj lokoj.

Taglibro de Anne Frank (La Postdomo) trad. el la nederlanda :

G. J. DEGNKAMP — 219 p. — 7 ilustraĵoj kaj situplanoj. Tole bindita kun ora surpreso. Prezo. gld. 7,80. Eld. Heroldo, Scheveningen.


Oni komparis la taglibron de Anne Frank, mortinta en koncentrejo Bergen-Belsen (1945) kun la « intimaj kajeroj » de l'rusa mirinfano en Parizo, Marie Baskirtsew. (1860-84) Sed kontraŭ ties konscia ambiciemo la taglibro de Anne, sen speciale literatura pretendo, despli kortuŝas. Ĝi reliefigas kontraŭ minaca fono kaj drama fino, pro burĝona talento, frua klarjuĝo pri la sinteno de devige kunvivantaj kaŝloĝantaj judoj kaj memanalizo de adoleskanta knabino.

La libro, jam tradukita en 25 lingvoj (aperis la nederlanda 26a eldono) estas en ĉiu medio tro bone konata, ankaŭ per filmo kaj teatro, por ke necesu detali. La merito de la esperanta eldono estas ĝia relativa aktualeco kaj precipe la valora laboro de samideano Degenkamp, kiu sin konsciencie klinis super ĝi, kiel iam niaj pioniroj super la formiĝanta lingvo. Li ofte trovis per la elementoj de la lingvo mem, la bezonatajn vortojn, ekz. por banalaj uziloj, kaj prave ne sekvis la nuntempan neologisman vojon, kvankam okaze ĝi ŝajnas preferinda (« puzlo » anstataŭ « paciencludilo » Aliflanke « tiri la gargarilon » (p.p. necesejo) necesigas ne plu uzi ĝin kiel ... medikamenton.

La traduko estas agrabla flua sed reevidentiĝas, nun por nederlandlingvanoj, ke la ordinare familiaraj esprimoj ne ankoraŭ tute estas reprodukteblaj en nia iom grava, sufiĉe formalema Esperanto. Malgraŭ la jam ofte sukcesa solvo de la singarda tradukinto, oni krome atendus foje kaj ree aŭdacan provon. Ekz. « Ik schrik mij een mik » (terurita) « De bokkepruik ophebben » (malbonhumora) « Werd ik thuis afgeleverd » (reakompanis min hejmen) « Zulke uilen » (stultuloj) « Een knappe bol » (lerta) « Ik had geen zitvlees » (ne sidema) « Getikt » (frenza) k.s.

Estus mirige ke ĉiu ĉiam kun ĉiu tradukitaĵo konsentus (glimp — p. 5 — ĉu « rideto » ?) sed tio, kion prezentas Degenkamp estas tre rekomendinda kaj speciala al ... nederlandlingvanoj, se estus nur por lerniga komparado kun la originalo. Bela, bonpapera eldono zorge reviziita.

TYN.



JUNULGASTEJOJ

*sekura restado
malmultekosta loĝado
internacia atmosfero*

**Vlaamse Jeugdherbergcentrale
HOPLAND 50 ANTWERPEN**

Leander TELL « **La Bela Subtera Mondo** ». Libro pri grotoj. Kovrilo de John Hartley. 54 ekstertekstaj bildoj. Eldonis Stafeto Popularscienca eldonserio Nr. 3. Juan egulo PEREZ en La aguna, Tenerifo, Kanariaj Insuloj 1959.96 + 24 paĝoj. Prezo 2 dolaroj.

La 20jarcenta homo povas diri ke la supraĵo de la tero estas konita. Restas efektive nur kelkaj malmultaj terpartoj en centraj Amazonio, Aŭstralio, Nov-Gineo kaj la Antarktiko kiuj ankoraŭ atendas plenan malkovrigon. Intertempe la homo komencis la esploradon de la aero, de la marprofundo kaj ankaŭ de la terprofundo. Pri tio aperas nun sciencaj kaj popularsciencaj eldonoj kiuj vekigas relative grandan interesiĝon. En tiu kadro ni salutas la alvenon de tiu-ĉi libro kiun ni povus nomi enkonduko en la speleologio. Ĝi estas verkita de esperantisto, kompetentulo kaj spertulo. Ni devas diri ke ĝi alportos nenion novan en multaj lingvoregionoj. En la plej multaj naciaj lingvoj, ankaŭ en la nia, ekzistas jam bonaj kaj interesaj verkoj. Sed Esperanto ekpenetras ĉie — tiel ke, laŭ Einar Dahl, la Eŭropa periodo de Esperanto forpasis jam ! — ankaŭ tie kie eble ne ankoraŭ ekzistas libroj pri la subtera mondo. Tie Esperanto povas esti pioniro de nova scienco (!). Sed mi pensas ke la efiko de tiu-ĉi belaspekta kaj bone ilustrita libro estos pli ke samideanoj kiuj ĝis nun nenion « sentis » por tiu branĉo de la scienco, estos allogataj de tiu-ĉi publikigaĵo kaj volos ion scii pri la cetero tre interesa speleologio. Leander Tell malkovras facetojn tute ne suspektitajn de la scienco pri grotoj ; li dediĉas ĉapitron al la gutŝtonoj ; li parolas pri la esplorado mem ; donas superrigardon pri la grotoj en la mondo ; rakontas aventurojn travivitajn dum grotesplorado kaj fine priparolas la fosiliojn kaj pentraĵojn en la grotoj. La 2.000 ekzempleroj certe trovos baldaŭ sian vojon al la biblioteko de la esperantistoj.

F. R.

Firma Van Iseghem & Verstraeten,

P.V.B.A.

ST BERNARDSE STEENWEG, 631 HOBOKEN

VITRALOJ - SPEGULOJ - „SECURIT” VITRO

KOLORIGITAJ VITROJ

ALUMINIAJ SENMASTIKAJ STANGOJ POR

KUPOLOJ

VITRO-CEMENTO POR TUTVITRA-KONSTRUJAĴOJ

MASTIKO

telefoon 37.88.20

Fl.L.E.-anoj kiuj aliĝis al la 45-a kongreso:

La sekretario G. Maertens deĵoras en la akceptejo ĉiun matenon ek de la 8-a ĝis tagmezo. Si vi volas paroli al la direktoro de nia libroinstituto, vizitu la librostandon, kie S-ano Joerentont deĵoras dum la tuta semajno.



Afd. Gent en Leuven.

Bezoek aan St.-Kamillus-instituut, Bierbeek.

Op 24 april l.l. werd het St.-Kamillusinstituut te Bierbeek, op vreedzame wijze ingenomen door twee legerafdelingen van Flandra Ligo de infanteriegroep uit Leuven en de mobiele brigade uit Gent. — Dit geschiedde ter gelegenheid van het Zilveren Jubileum van Eerwaarde Broeder Arni, 25 jaren zelfopoffering in de ziekenverpleging en 15 jaren actieve Esperanto-beoefening, die de naam van "Frato Arni" wereldkundig hebben gemaakt.


Aan de ingang van het machtig gebouwenkompleks werd een geslaagde greepsfoto genomen, waarna, onder geleide van de Eerwaarde Jubilaris en van zijn ijverige kollega, Eerwaarde Broeder Basilianus, een bezoek werd gebracht aan enkele paviljoenen.

Eens te meer dient hier een warme hulde gebracht aan het verborgen doch dikwijls heldhaftig liefdewerk van de Eerwaarde Broeders van Liefde en van hun toegewijd lekenpersoneel, dat erin slaagt aan de ongelukkige zieken een maksimum van huiselijke vreugde en netheid te bezorgen en zeer dikwijls de genezing. Onbeschrijflijk en hartroerend.

Met beide voeten vielen de bezoekers terug op aarde in een met guirlandes en esperanto-vlaggen versierde zaal, waar een smakelijke luch stond te wachten en dhr. De Boes en Mevr. Meurrens een woord van hulde en oprechte dank wijdden aan de Eerwaarde Broeder Jubilaris. Op zijn gekende eenvoudige en hartelijke manier antwoordde Frato Arni en drukte de wens uit nog menigmaal zijn bezoekers te mogen ontvangen.

Deze gevoelsuitwisselingen misten hun uitwerksel niet en weldra klonken de entoesiaste esperanto-liedjes door de ruime feestzaal. Helaas, te vroeg moesten wij afscheid nemen.

Eerwaarde Frato Arni, nog vele jaren dure uw apostolaatswerk en uw onvermoeide inspanningen ten gunste van Esperanto.



UNUA VICO DE MALDEKSTRE AL DEKSTRE

S-ino Neefs Leuven
 Vanneste Gent
 Frato Arni - Bierbeek
 De Boes - Gent
 F-ino M. Saelemaekers Leuven
 F-ino E. Costrop Leuven
 F-ino D. Cuypers Leuven
 S-ino A. Meurrens Leuven

DUA VICO

H. Boving Rotselaar
 F-ino D. Van Billoen Herentals
 E Brandt
 S-ino Vandevelde - Gent
 F-ino Begodt
 Ghislain Jacobs Kessel-Lo

TRIA VICO

Frans Frantzen Kessel-Lo
 Nevino De Boes - Gent
 S-ino De Boes - Gent
 Felix Neefs, Prezidanto LEA Leuven
 S-ino A. Stroobants - Leuven
 F-ino J. Derwa - Leuven

LASTA VICO

J Van Bilsen Kessel-Lo
 Van de Velde Gent
 F-ino Lona Meurrens Leuven
 S-ino N Brandt - Leuven
 F-ino Maria Hublou Heverlee
 Löderer - Gent

Afd. Antwerpen.

De cursus werd met vrucht gevolgd door de volgende kursisten Hr. Dr. E. Op de Beeck (Antwerpen), Mej. M. Peeters en J. Dilliën respectievelijk van Herentals en Borgerhout. Twee van hen sloten reeds bij UEA aan, en zullen deelnemen aan het internationaal kongres te Brussel.

Deze Esperanto-leergang werd ingericht onder de auspiciën van de V.T.B.

Wij wensen de nieuwe Esperantisten geluk, en danken allerhartelijkst de Hr. Vermuyten, lesgever, en de V.T.B., voor de verleende tegemoetkoming.

Afd. Aalst.

Op 11.6.60 werd examen afgenomen van de kursisten die de Esperanto-leergang van de Hr. Debondt hebben gevolgd. Slaagden uitstekend in deze mondelinge en schriftelijke proef :

1. Mej. A. Callebaut
2. Mej. L. Beekman
3. Hr. M. Demesmaeker
4. Hr. J. De Naeyer
5. Hr. U. De Wachter

De examencommissie bestaande uit Mej. Terryn, Drs. Roose en A. Dumarey konden niet anders dan werkelijk perplex staan nopens de resultaten door ons lid de Hr. Debondt in een dergelijk korte periode bekomen. Wij begroeten dan ook de nieuwe Esperantisten hartelijk in ons midden en danken de lesgever voor zijn prestatie. Weze aangestipt dat de Hr. De Naeyer reeds een veteraan in de Esperanto-beweging is, die thans, na lange rust opnieuw de Esperantogelederen is komen vervoegen en het zelfs heeft aangedurfd zich te meten met de jeugd.

Hier mogen wij ook Mej. Decock vernoemen, want zij is het die jarenlang de Esperantovlam te Aalst heeft brandend gehouden, en die op deze elfde juni een mooie dag beleefde, beloning voor zoveel pogingen die niet zo succesvol waren geweest.

Diezelfde dag werd ook nog de afdeling van de V.E.B. gesticht, met als Voorzitter natuurlijk de Hr. Debondt, als ondervoorzitster Mej. Decock, sekretariaat : Mej. Callebaut, en voor de geldelijke zorgen, Mej. Beekman. De Hr. De Naeyer is raadslid en voor de zware taak van de informatie werd de Hr. Demesmaecker aangesteld, die op dit gebied reeds pluimen heeft verdiend.

Wij kijken verder naar U, Aalst !

Afd. Brugge.

Hier heerst natuurlijk een koortsachtige bedrijvigheid in het vooruitzicht van het kongres : wij namen in samenwerking met de Brugse Esperanto groep van R.B.L.E. de moeilijke taak op ons de ééndaagse uitstap naar Brugge en Oostende te verzorgen en daarenboven een drietal films van een Esperantotekst te voorzien, om tenslotte nog in te staan voor de boekenstand tijdens de kongresweek, in samenwerking met B.E.I.

Meer nieuws voor na het kongres !

se vi parolas pri strovi... vi pensas pri
viandaĵejo. se vi pensas pri viandaĵejo... vi
aĉetas ĉe

STROVI

Vlamingstraat, 48 BRUGGE

STROVI

Varoj :

GARANTIO pri

bona kvalito

kaj bona prizorgado

Telefono : pogranda komerco 34559

detala " 33408

STROVI estas unuaranga!



- ★ por viaj eksterlandaj
transpagoj
- ★ por ŝanĝoj en la plej alta
kurzo
- ★ por vojaĝdevizoj

Bank van Roeselare & Westvlaanderen

Sidejo : ROESELARE

Noordstraat, 38 Belgujo

38 Agentejoj kaj oficejoj en la tuta provinco de Okcidentflandrujo.

manuŝakturaĵo ŝirmo DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) Tel. (056) 216.54



VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko

la perfekta konfekcio

fabrikitaj el plej bonaj svisaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj



PRECIPAJ CENTROJ:

Antwerpen	Aalmoezenierstr. 2 Abdijstr. 57 Anselmostr. 17 Nationalestr. 87
Arlon	Marché-aux-Légumes 16
Brugge	Breidelstr. 8
Brussel	Galerie d'Ixelles 9 Anspachlaan 194
Eupen	Kirchstr. 14
Gent	Brabantdam 25
Herstal	Rue Large Voie 4
Leuven	Bondgenotenlaan 29
Luxembourg :	Place de la Gare 67
Mechelen	Grootbrug 8
Roeselare	Ooststr. 124
Tournai	Rue Royale 75
Turnhout	Herentalstr. 6
Verviers	Pont St. Laurent 2